

	<h1>PENSEO</h1>	<p><i>N-ro 144</i></p> <p><i>Okt./2003</i></p>
<p><b>Monata Beletra Revueto en Esperanto</b>  <b>Honorita de Premio Grabowski, 1994</b></p>		
<p><b>Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 13-a jaro</b> <a href="http://www.elperno.net/penseo.htm">http://www.elperno.net/penseo.htm</a></p>		

## Grasulo kaj Malgrasulo

### Feng Jicai

En ĉi tiu urbo, Grasulo kaj Malgrasulo estis amikoj. La korpo de Grasulo, kiu mirige dikis, kvaroble egalas al tiu de Malgrasulo, kiu surprizige magris.

Tiam, Grasulo estis bonŝanca. La altranguloj devis esti grasuloj, pentristoj senescepte pentris portretojn de grasuloj, kaj eĉ virinoj elektis grasulojn kiel siajn edzojn. Oni diris, ke grasaj homoj povas prezenti la veran virecon, ĉar ili havas kolosan korpon kaj fortan energion. Sekve ekaperis la tendenco: ju pli dikkorpa, des pli bona. Grasulo, la plej dika homo en la urbo, rikoltis ekstreman priatenton. Oni venis al li por informiĝi kiel grasiĝi; liaj fotoj, rimarkoj, anekdotoj vete publikiĝis. Interalie, li malkaŝis du pecojn da sperto de sia pligrasiĝo: pli da dormado kaj pli da manĝado, kaj senmovemo pli bonas ol aktivemo. Tiujn vortojn ĉiuj urbanoj elbuŝigis kiam ili parolis, kaj rigardis kiel moton. Se oni sekvis tiujn konsilojn, efiko ekriveliĝis vere! Pro tio, grasuloj pli kaj pli multiĝis, kaj eĉ iuj, kiuj ne povis grasiĝi por momento, afektis sian grasiĝon per blovitaj vangoj kaj pufigita ventro.

Iufoje, Grasulo estis ĝenata de grupo da ĵurnalistoj kaj tiuj devigis lin eldiri la sekreton de grasiĝo. Li laŭvole diris, “Necesas surhavi lozan veston kaj malstreĉitan zonan.” Ĝuste pro tiuj vortoj, la lozaj vestaĵoj tuj elvendiĝis kaj diversaj specoj de zonoj stagnis en

vendado. Tiumomente la famon de Grasulo superis tiu de reĝisoroj, aktoroj, pilkosteloj, inventistoj, magiistoj kaj homoj kun speciala kapablo.

Iutage, Grasulo gaje iris viziti sian malnovan amikon Malgrasulo. Vidante lin boneca, li, per sia graskarna fingro, montras al la riboj de Malgrasulo, dirante, “Nun ĉiuj urbanoj sekvas mian ekzemplon. Kial vi, kiel mia bona amiko, ne fari la samon? Ĉu estas homo pli malgrasa ol vi en la mondo?”

Malgrasulo, kun apenaŭ videbla rideto, diris memfide, “Via bonŝanco estas portempa. Ĝis kiam via influo forpasos, jen mia vico venos. Atendu kaj vidu.”

Post unu jaro, vere okazis ŝanĝo. Cirkulis diraĵo oni ne sciis de kie: grasuloj ofte emas spiregi, ŝviti kaj movmalfacila; tro da akumulita graso kondukas al angiaj malsanoj; kaj cent malutiloj paras kun nur unu utilo. Kiam malpliĝis la kuriozeco kaj intereso de oni pri unu aĵo, ĝia malaĵo montris sian magipovon. Kiel blovo de vento, tiu diraĵo flugis tra la tuta urbo. Tuj sekve aperis en ĵurnalo la tutpaĝa artikolo *Estas Bone Fariĝi Malgrasuloj*. Kun tre logika rezonado, ĝi pravige laŭdis malgrasecon kaj mallaŭdis grasecon, kaj komentis: malgrasuloj estas movfacilaj, malpezaj, okupante malgrandan spaco; iliaj koroj eltenas malgrandan premon, tiel ke estas malfacile por ili suferi angiajn malsanojn; statistike, el longvivaj homoj, 98 procentoj estas malgrasuloj, 1 procento nek grasaj kaj nek malgrasaj homoj, kaj nur 1 procento grasuloj, tial estas okaza fenomeno, ke grasuloj longe vivas.

Ekde tiam, oni komencis doni atenton al malgrasiĝo. Finfine Malgrasulo, kiu ĉiam dronis en onia forgeso, estis eltrovita kvazaŭ kiel rara trezoro.

La sperto de malgrasiĝo estis ĝuste mala kontraŭ tiu de grasiĝo, kies recepto jenas: limigo de manĝaĵoj, vegetara dieto, malmulte da sukero, nedrinkado de biero, matena boksado, postmanĝa promenado, sportekzercado... Pro tio, tiuj, kiuj verkis artikolojn por laŭdi grasulojn, komencis konvertiĝi al laŭdantoj de malgrasuloj. Ili skribis amason da eseoj kun multaj citaĵoj por pruvi kiel valora, fidinda kaj prava estas la sperto de malgrasiĝo. Ili ŝutis sur malgrasulojn tiajn flataĵojn kiaj “la plej bona korpopezo”, “la korpopezo plej konforma al la demando de la epoko” kaj “tipaj figuroj”. La sciigoj pri grasuloj malaperis tute el ĵurnaloj. Malgrasulo, kiel vento, laŭdite, soris al la ĉielo. Kaj neĝere flirtis liaj fotoj, anekdotoj, spertoj, interesaj novaĵoj, rimarkoj, intervjuoj kaj raportaĵoj.

Iutage, Malgrasulo renkontiĝis kun Grasulo surstrate. Tiu, kiu sentis sin forlasita, malgaja kaj malvigla, kortuŝite diris al Malgrasulo, “Viaj vortoj estas pravaj. Se mi sekvus vian konsilon tiutempe kaj min malgrasigus! Nun estas malfacile por mi igi min maldika.”

Ĉe tiuj vortoj, Malgrasulo, svingante sian fingron similan al seka branĉeto, admonis, “Ne! Vi devas teni vin tia. Kiu scias, je kiu tempo oni adoras grasecon!”

elĉinigis Liu Mingbai

## La Mond' de l' Aglo

*Mosa*

1.

kiam la fenikso ora  
en la brulo matenruĝa  
jan celante al la suno  
flugas sur vojaĝo sinofera  
l' aglo ĉe neĝmonto frosta

flugas al silento

2

l' aglo  
la poemo tre penetra  
jungas la sencsituacio vasta  
ŝvebas super horizont' de skribpapero

3

l' alto fluga estas ja sufero  
tian alton kuraĝec' alcelas  
l' alton l' agl' pendigas  
sur mizeran flugiparon

4

l' agl' senvoĉe glitas  
sombre la inspiro  
flugas tra krepusk' poema

5

la ŝtalecaj plumoj  
en aerfluo de la vento  
etendiĝas, puncaj sovaĝrozoj  
en flagranta ombr' malhela  
alrigardas l' aglan grandiozon

6

en prestidigita sonĝo  
en lunnokt' de l' sonĝo  
l' agl' per vera flugo  
ŝvenas tra la rememor' dormanta

7

la ĉielo mistera  
nuba maro  
tajdo ondbrilanta  
la totemo de ĉiel' kaj maro  
pere de la vento  
inkrustiĝas sur la agla flugilparo

8

kiam la obskura ombro fluga  
malaperas en ĉiela bluo  
sin dissolvas en nemezurebla foro

l' aglo kiel mia pensfadeno  
jen fandiĝas en kviet' solena

9

frosto en aero alta  
konkretigas fridon  
l' agl' fariĝas  
sankta pro soleco  
eĉ kriĉado trista  
ankaŭ povas ja elvoki  
la deziron kaj kuraĝon

10

l' agl' kelktempe splenas  
des pli en veter' melankolia  
ĉiuj malplenaĵoj ĉagreniĝas  
dume l' okuloj aglaj  
skribas larĝe la tempestan jeson

11

l' agl' vagflugas en okulokavoj  
distas la rigardoj kiel aŭtunveno  
sed printemp' malantaŭ la pupiloj  
proksimas tre al mia koro

12

vol' ŝtaleca ingas tra la korpo  
superŝvebas jarojn, historion  
en sublimaj pensoj  
jen sin trovas la neĝpint' fajranta  
l' aglo sidas  
en la kavo kun glacipendaĵoj

elĉinigi **Hongjia**

Enpaki Nian Amon

Yang Qingshu

En nia urbeto, se oni ne edziĝas super la aĝo de 30 jaroj, estas certe, ke ili ne havas bonajn “naturajn kondiĉojn” tiajn, kiaj malbela aspekto kaj psikologiaj mankoj, aŭ ili inklinas fariĝi bonzoj (ĉe ni estas multaj

tempoj kaj bonzoj), aŭ io okazas al ilia cerbo.

Dankon al Ĉielo! Mi jam edziĝis ĝuste en la jaro kiam mi ĵus atingis la aĝon de 30 jaroj, ĉar feliĉe la supre-menciitaj tri kazoj ne falis sur min.

Vi preferas danki vian edzinon ol Ĉielon, Qing diris. Se mi ne firme decidus edziniĝi al vi, vi ankoraŭ estus fraŭlo ĝis nun.

Mi jesis senĉese, kaj riverencadis al Ĉjing.

Ĉjing estas mia edzino.

Se oni faras zorgeman komparon, oni trovas, ke edzeco kaj fraŭleco havas siajn proprajn avantaĝojn. Edzeco signifas, ke vi ekhavas varman manĝon; ke vi kunportas enviindan hejmsopiron kiam vi vojaĝas foren; kaj ke, se vundita ekstere, vi povas hejmeniri por leki vian vundon trankvile. Tiuj estas la avantaĝoj de edzeco.

Fraŭleco signifas senzorgecon. Se vi sate manĝas, via tuta familio satiĝas; se vi volas senkonsidere veturi tien kaj ĉi tien tra la mondo, neniu, vin sekvante, vin sakris; se vi estas mallaborema, tio ne gravas, ekzemple, kiam matene vi vin elŝovas el la litkovrilo, ĉio estas farita se vi persone eliĝas sen... Se paroli pri litkovrilo, hehe...

Post mia edziĝo, mi ofte ridas tiamaniere. Se mi ridus antaŭ la edziĝo, la rida maniero elspirus murdecon kaj insidecon; tamen post la edziĝo, la rida maniero prezentas senhonteman kaj obstineman aspekton — mi ridas tiamaniere, ĉar mi faras ion malpravon. Mi kredas, ke tia rido ne estas fremda al 99 procentoj de edzigitaj viroj.

Mi ofte ridas tiamaniere.

Mi ridas tiel, pro tio, ke Ĉjing estas purema kaj ordigema, kaj ĉiam devigas min faldi la litkovrilon nete kaj rektlinie, kvazaŭ hakita per glavo. Ĉu necesas? Mi demandas. Tio estas en hejmo, sed ne en kantonmento. Vi estas mia edzino, kaj mi ne estas soldato en via subplotono.

Ŝi rikanas kontraŭ mi.

Ŝia rikano pleje senesperigas min. Kompare

